FN PER ANC 47

# NORMANDA ESPERANTO-BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO    N° 2I
SEPTEMBRO I972.

Redaktas: S-ro JOUIS E. 62I Rue Georges Mugnier. 76 BOISGUILLAUME.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la IOa de Novembro, IOa de Majo, IOa de Aŭgusto, IO de Novembro.

ENHAVO.

Ĉu mortas nia unuiĝo?
Ĝenerala Kunveno en Rouen ( raporto)
Reelekto de la estraro
Kiel varbi novajn lernantojn? ( daŭrigo.)
Sugesto pri senpaga informado.
Estrara kunveno de la Normanda Federacia en Lisieux.
Korespondaj kursoj de U.F.E.
Vivo de la Grupoj.
Distraĵoj.

## ĈU MORTAS NIA UNUIĜO ,???

" Stranga titolo! " eble vi pensas.

Jes, efektive, tiu titolo unuavide aspektas stranga. Laŭ supraĵa rigardo, nia unuiĝo fartas kiel eble plej bone; ĝia kaso estas plena, ĝia bulteno aperas regule, kaj ĝiaj membroj eĉ montris antaŭ nelonge, ke ili satas ĝin, ĉar kiam ni havis malfacilaĵojn por presi la bultenon, tuj spontanee la anoj grandmase sendis monon por aĉeti maŝinon, kaj la mono ricevita estis sufiĉa por pagi la 2 trionojn de la prezo! Ŝajne, do, oni tute ne rajtas plendi!

Tamen.... Ni konsideru nun la staton de nia asocio laŭ alia vidpunkto. La vigleco de grupo ne mezuriĝas laŭ la stato de la kaso : kiam homo mortas, li foje havas sufiĉe da mono en sia bankkonto. Ĉu nia Unuiĝo vere havas aktivan vivon? Ĉar tio estas la ĉefa fakto por juĝi pri ĝia bona stato!

Fine de Majo okazis en Rouen la Ĝenerala Kunveno de la Normanda Unuiĝo. Ni 2-foje anoncis ĝin en la Bulteno. Plie, la organizinto, Petro Lemarchand, longe preparis kaj pripensis la problemojn de la asocio kaj verkis sugestojn por diskutado, kaj oni efektive tre interese diskutis ilin dum la kunveno Sed kiom da personoj ĉeestis? nur I8!!......

Antaŭ la kunveno, ni petis novaj kandidatoj al la estraro kunveni ĝu sin. Ĉu vi scias kiom da personoj skribis al ni ? Nulo! Cetere, la est-

ne povis okazi, pro tro malgranda nombro da ĉeestantoj!!

La ĵurnalistoj ne venis por raporti pri nia kunveno. Ĉu ni devas bedaŭri tion? Certe ne! Kian ideon ili havus pri la Esperanto movado vidante, ke kiam la Normandaj Esperantistoj kunvenas, ili estas malpli ol 20 !

Fine, antaŭ 2 jaroj kaj duono, ni akceptis provizore presi la bultenon kvankam ni havas multege da ĉiuspaca laboro: profesia kaj poresperanta. Malgraŭ niaj alvokoj, ĝis nun neniu proponis preni sur sin tiun taskon; kelkaj samideanoj proponis sian helpon por prepari la bendojn, la adresojn, K.T.P. sed la ĉefa laboro retas en niaj manoj. Ĉu neniu Normando povas zorgi pri tiu grava tasko?

Post tiuj konsideraj, ĉu vi opinias, ke nia asocio estas forta kaj vigla? Antaŭ 10 jaroj, ĝi havis kongresojn ĉiujaere, kun 100 ĝis 120 partoprenantoj kaj eĉ pli, ĉu ni progresis? Kaj ĉu tiel disvastiĝos Esperanton en nia regiono? Ne ! Ni ne estas sur la ĝusta vojo. Doni monon kaj legi la bultenon ne sufiĉas. Se ni volas vivi kaj precipe progresi, ni devas ĉefe "L A B O R I ".

Ni do laboru por reakiri viglecon. Se ni vere ŝatas la Normandan Unuiĝon kaj Esperanton, ni klopodu per ĉiuj niaj fortoj, por ke ili vivu!

R. POTTIER.

---

GENERALA KUNVENO EN ROUEN.

La 27an - 28an de Majo 1972.

Kiel jam anoncite en la antaŭaj numeroj, okazis en Rouen, fine de majo, la 36a Generala Kunveno de nia asocio.

Jam la 27an, komence de la posttagmezo, alvenis, el diversaj urboj, Esperantistoj en la loko " Halles aux Toiles ", kie ilin atendis bela ekspozicio. Dum kelkaj vizitis la vidinda ĉefurbon de nia provinco aliaj havis pli seriozan okupon: ili trapasis la diversajn ekzamenojn. Sed poste ĉiuj retroviĝis kune por la vespermanĝo, kiun sekvis tre gaja Interfratiĝa Vespero lerte organizita de Pariza Grupo da junaj fervojistoj, kiu plej bone finis tiun unuan tagon.

Dimanĉe, je la 9a malfermiĝis la laborkunsido. Oni ofte riproĉis tute prave, ke dum la kongresoj de U.N.E. nur okazas la reelekto de la estraro kaj la raportoj de la grupoj, sed neniu vera laboro. Por eviti tion oni publikigis en la pasinta bulteno liston da ideoj kiujn oni povus eventuale diskuti dum la kunveno, kaj efektive oni multe diskutis pri kelkaj punktoj elektitaj el tiu programo.

S-ro Chalm kaj S-ro POTTIER donis kelkajn ekzemplojn de praktika uzo de Esperanto en Internaciaj privataj rilatoj kun firmaoj, hoteloj,

radiostacioj eĉ al la N.A.S.A. kaj Soveta Scienca Akademio K.T.P. kiam ili parolas pri la lingvaj problemoj aŭ spertas ilin en siaj internaciaj rilatoj Ili ankaŭ proponis, ke oni mendu Esperanto-librojn pere de ordinaraj librovendistoj. Oni ankaŭ diskutis pri la problemo de la bulteno, kiun nun posedas S-ino Pottier. Sed ĉar ŝi nun havas multe da profesia laboro kaj familia laboro , ŝi malfacilege trovas la necesan tempon. S-ro Lemarchand proponis sin por prepari la bendojn, k,t,p, por helpi ŝin. Oni ankaŭ parolis pri aperigo de diversaj artikoloj kaj novaj rubrikoj, kaj oni decidis sendi provekzempleroj al neabonantoj. Poste oni esprimis la deziron, ke la kongresoj okazu ĉiujare, preferinde alterne en Alta kaj Malalta Normandio, kaj foje kun Esperantistoj de aliaj regionoj por interŝanĝi ideojn, aŭ kune kun la Normanda Federacio de U.F.E.; sed ĝis nun tio montriĝis neebla nur pro personaj problemoj, ĉar U.N.E. kaj la Federacio havas celojn nesimilajn, sed ne kontraŭajn. Bedaŭrinde, neniu urbo proponis sin por esti kongresloko venontjare.

" KIU SIN PROPONOS? "

En la programo de la kunveno troviĝis la reelekto de la estraro Bedaŭrinde, pro manko da ĉeestantoj, oni rezignis pri tio, ĉar tiu tre interesa laborkunsido estis partoprenata de nur.....18 personoj! La voĉdono do okazos per korespondado.

Fine S-ro Bosc diris laŭ sia propa profesia sperto, ke Esperanto taŭgas por internaciaj komercaj interŝanĝoj kaj fermis la kunsidon dirante ke li est as konvinkita, ke ni trafos nian celon.

Post tiu kunveno, ĉiuj retroviĝis en Brasserie du Cirque por la Bankedo, kiu gaje finiĝis per kantoj dank'al la partopreno de la junaj fervojistoj.

---

" Se vi bezonas sendi al ni urĝan lastminutan informon,
Telefonu al Sino Pottier
N° 808 en Yvetot.
ekster la laborkunsidoj.
Antaŭan Dankon.

==============================

Ĉu vi konas la adreson de iu Esperantisto kiu ne ricevas nian bultenon?
Se jes en tiu kazo, sendu tuj al ni ĝin, por ke ni sendu al li senpaga provekzempleron.

==============================

NOVA LERNJARO KOMENCIĜAS.......

Por ne forgesi, tuj sendu vian kotizon( 2 Frankoj) al
" Union Des Esperantistes de Normandie"
C.C.P. ROUEN 283 - 40 - E

Kasisto Sro JOUIS E. 621 Rue Georges Mugnier 76 - BOISGUILLAUME

PAGU TUJ KAJ AMASE.

DANKON!!!!

KIEL VARBI NOVAJN LERNANTOJN? ( dùrigo , vidu Nº 14)

Ĉar venas la tempo de la rekomenco de la kursoj ni denove devas pripensi la diversajn rimedojn por propagandi Esperanton. Unu el la plej trafaj estas la " Informa Vespero ".

Por organizi informan vesperon, oni ne bezonas multe da materialo. En publika salono, oni nur organizas ekspozicion de diversajn dokumentojn; kiujn ĉiu grupo nepre posedas: Libroj, turismaj kaj komercaj prospektoj, gazetoj, diskoj (kiujn oni posedas, kaj povas aùdigi) k;t;p. Tiu ekspozicio tamen ne estas la ĉefa afero; ĝi nur celas pruvi, ke, Esperanto estas valora kaj utila lingvo; sed la kerno de la kunveno estas la paroladeto pri la problemo de la lingvoj. Tute ne estas necese esti oratoro por fari tion; se oni avertas la ĉeestantojn, ke oni nur volas fari ne prelegon, sed nur amikan paroladeton, ili facile akceptas tion. La ĉefa afero estas havi trafajn kaj nerifuteblajn argumentojn, kaj ne tedi la aùskultantojn. La parolado devas esti simpla kaj foje amuza; oni eventuale povas tiucele rakonti personajn anekdotojn montrantajn la malfacilaĵojn kiujn oni renkontas vojaĝante tra eksterlanda regiono. La parolado devas adaptiĝi al la publiko; tamen; jen estas ekzemplo de plano kiu povas taùgi en ĉiuj cirkonstancoj.

1°) Enkonduko ( ekzemple, komparo inter " organizitaj vojaĝoj " en kiuj oni sentas la lingvajn malfacilaĵojn sed ne havas kontaktojn kun la popolo, kaj "personaj vojaĝoj", multe pli malfacilaĵ.

2°) La lingva problemo ( pli ol 2.000 lingvoj.)

3°) La " Grandaj lingvoj " (tro multaj , maljusta solvo, ĉar ĝi avantaĝas kelkajn naciojn; kiam 2 personoj uzas la lingvon de unu el ili, tiu-ĉi esprimas sin multe pli facile ol la alia; ĉiu "granda" nacio ŝatus trudi sian lingvon al la aliaj.)

4°) " Mortinta Lingvo", Tiuj lingvoj estas malfacilaj kaj mankas je morderna vortaro; en la latina oni ne povas diri; "Mi eltiras mian naztukon el mia poŝo" ĉar ekzistas nek " Naztuko " nek " poŝo". Dum la konsilio la episkopoj ofte preferis uzi modernan lingvon en la komisionoj.

5°) La sola ĝusta solvo : arte-farita lingvo, kiu povas esti facila, preciza kaj moderna.

6°) Esperanto:

a) Facila gramatiko, nur 16 reguloj senesceptaj.

b) Facila vortaro ( montri la sistemon de vortfarado; ekzemple uzante la radikon " varm ")

c) Jam bone disvastigita.

d) La delegitoj de U.E.A. kaj aliaj servoj.

e) Libroj kaj gazetaro.

Post la parolado; kompreneble oni lasas la publikon fari demandojn; al kiuj oni devas respondi simple kaj sincere.

Se oni agas lerte oni povas facile konvinki la ĉeestantojn... se ili venas. Pro tio, oni nepre devas anonci la vesperon per ĉiuj eblaj rimedoj: ĵurnaloj, afiŝoj, flugfolioj, k,t,p.

Kaj nun,..... bonan Kuraĝon.

---

KOMITATKUNVENO DE LA FEDERACIO EN LISIEUX

La 22an de Junio kunvenis en Lisieux, je la IO-a Horo la komitato de la Normanda Federacio, ĉe la bufedo de la staciddomo, por aŭdi la raporton pri la kongreso en Vire, kaj ekzameni la situacion post tiu kongreso.

S-ino Vincent legis la raporton pri la kongreso, kaj S-ro Colleu la bilancon (enspezoj 3135 F.; elspezoj 3130,90= saldo 34,IO). Ambaŭ raportoj estas aprobitaj. S-ino Vincent legis proponon pri kongreso en Parizo. Poste ŝi parolis pri la rilatoj kun U.N.E. kaj esprimis sian deziron, ke la Federacio havu sian propan bultenon. S-ro Pottier respondis ke la venonta bulteno ĉiam publikiĝis ĉion, kio rilatas al la Federacio. Post diskutado; oni decidis kontakti U.N.E. por scii ĉu la Federacio povus havi pli da spaco en la Bulteno.

La komitato konstatis kun bedaŭro, ke la Francoj ne sufiĉe konas la kultudomon de la Francaj Esperantistoj en Gresillon, kiun ĉiuj eksterlandanoj envias. Ĉiu grupo devus ĉiujare peti programon kaj propagandi pri ĝi.

Oni ankaŭ decidis propagandi en la Grupoj pri la Fonduso-domo kaj organizi en Caen seminarion por la grupestroj la Ian dimanĉon de septembro 1973, pri la grupaj problemoj, (organizota, se eble, pere de la Turismofivejo). Oni ankaŭ decidis doni ĉiujare stipendion por fari vojaĝon al la plej bona laŭreato de Atesto pri Kapableco.

Fine, oni fiksis la venontan datonpor kunveni, la 8an de Oktobro 1972 en Rouen.

La kunveno estis fermita je la I6a horo.

---

Se ne estas kurso en via urbo.

Vi povas lerni Esperanton; aŭ perfektiĝi, per la Korespondа kurso de U.F.E.

Unuagrada : 50 Frankoj entute ( membreco inkluzive)
Duagrada : 60 Frankoj.
Triagrada : 30 Frankoj + libroj ( historio de Esperanto kaj mistêro minora;)

---

Ĉu vi translоĝiĝis ?

Se jes tuj sendu al ni vian novan adreson DANKON.!!!!

## VIVO DE LA GRUPOJ.

YVETOT. 4 lernantoj sukcese trapasis la Ateston pri Supera Lernado S-ro Gilbert BETTENCOURT, F-inoj Monique Leroux kaj Véronique Lecouteur, kaj Marie-Claude Gervais.

En Junio okazis pikniko en la arbaro Brotonne, 3 personoj el Yvetot kaj 3 el Lisieux partoprenis ĝin.

En Julio, F-ino Marie - Claire BETTENCOURT edziniĝis en Bouville kun S-ro Loisel.

Ni sendas al la Nova paro kaj al iliaj gepatroj niajn bondezirojn kaj gratulojn.

Le Havre. Fine de Junio okazis sesio de ekzamenoj, kiun partoprenis Yvetot-anoj kaj Havranoj.

Fine de tiu monato okazos en le Havre Jara ĝenerala kunveno. Por pli preciza dato sin turni al S-ino Peltier 55 Rue de Richelieu. Le Havre.

La raportoj pri aliaj grupoj ne atingis nin ĝustatempe; tamen ni scias, ke Esperantista renkontiĝo okazis en TOUQUES komence de Junio.

---

SUGESTO PRI SENPAGA INFORMADO.

Esperantista turisto ! Kiam vi troviĝas en eksterlandaj urboj; petu de la Turismoficejoj, aŭ similaj instancoj ( kampadejoj, ratadejo kun pretendoj je internacieco, k.t.p,) la adreson de la Esperanto delegito de U.E.A.!

Ĉu ne estus same lerte ke la delegitoj deponu sian adreson ĉe tiuj samaj Turismoficejoj?

En favoraj cirkonstancoj la koncernataj instancoj konsentos afiŝi la adreson de la Esperantista respondeculo, ĉe videbla tabulo....

Jean GIBAUX.

---

Rimarko de la Bultenisto.

La delegito de U.E.A. aŭ la Prezidanto de la grupo devas ĉiam sin anonci en la urba jarlibro. La Turisma oficejo aŭ la hotelestroj ĉiam povis indiki mian adreson al neatendita Esperantisto en Rouen.

---

" REELEKTO DE LA ESTRARO "

Pro nesufiĉa nombro da partoprenantoj en la Generala Kunveno, oni ne povis elekti la novan estraron.

Vi do estas invitata voĉdoni perletere.

Estas kandidatoj.

Sinjorino LAVALLEE el Le Havre.
Sinjoro LEMARCHAND el ROUEN
Sinjoro CHALM Alain el Le Havre.
Sinjoro QUILLAUD el Sotteville les Rouen.
Sinjoro HUET el Le Havre.
Sinjoro JOUIS Edgard. el Boisguillaume
Sinjoro POTTIER Pierre el YVETOT.
Sinjoro Martin Camille el Lisieux.
Sinjoro Legret el Vire.
Sinjoro Tailpied el Touques I4
Sinjoro Gibaux el Le Havre.

Bonvolu elekti 7 el ili.........

---

VOĈDONILO

Mi elektas kiel estraranoj de U.N.E. ... jenajn kandidatojn..;

Bonvolu sendi tiun voĉdonilon al Sro POTTIER Pierre
21 Alleé des Roitelets 76 190 Yvetot.
antaŭ la I5a de Oktobro 1972.

## DISTRA PARTO

Ĉiuj vortoj kuŝas en la Plena Vortaro ilustrita, same kiel la difinoj.

### HORIZONTALE

I - Lobo insertita ĉe la akso de la plantembrio de la grajno.

II - Ia nombro de samspecaj objektoj Malalta arbustodense sidanta en kultivita regiono kun rozaj floretoj.

III - Punmortigu (kiel sudistaj usonanoj kontraŭ la negroj). Litero

IV - Sufikso. Malkresko aŭ miskresko de organo ( R. )

V - Adverbo. En maniero de persono konscia pri siaj veraj meritoj kaj virtoj

VI - Aŭdebla aervibrado. Batrako simila al bufo (R)

VII - Kurba osto ĉe la brusto (R) Titolo de ekleziulo(R)

VIII - Nea pronomo(R).

IX - Romia provinco, Friulo kaj Tirolo Demanda pronomo.

X - Tio, kio impresas la flarsenton. Manĝaĵo el faruno (R).

### VERTIKALE.

1/ - Ŝtato de USONO laŭlonge de Pacifiko

2/ - Kovri per maldika tavolo de iu mulvalora metalo.

3/ - Muzika sono (R) Stato de la ESP. Same kiel Zamenhof.

4/ - Veturilo tirata de besto. Sufikso pri unu el la elementoj de tutaĵo

5/ - Ofiviro


6/ - Sufikso pri ĉiu el la elementoj de tutaĵo. Konformi sin al ordono.

7/ - Dimensio alia ol longo kaj larĝo Sufikso pri membro de grupo.(R)

8/ - Ĉifero. Havanta firman konsiston

9/ - Arabdevena maŝino por suprenlevi akvon (R) Sufikso pri sekso ( R)

10/ - Birdo kiu bele naĝas, sed malbele marŝas.




Polycopié par le Centre Culturel d'Esperanto d'YVETOT.

Dépôt Légal 3ème Trim. 72
La Gérante Mme POTTIER.